

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =  
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 ore = 15 pfenigoj = 20 centimoj =  
8 kopekoj — por duonpaĝa petittinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

II: a jaro.

Aprilo 1897.

N: o 4 (16).

## Al la esperantistoj.

En aŭgusto de tiu ĉi jaro estos en Moskvo internacia medicina kongreso. Laŭ la sciigoj de gazetoj tiu ĉi kongreso estos granda kaj multaj eminentaj kuracistoj de diversaj landoj vizitos ĝin.

Multaj cirkonstancoj donas esperon, ke tiu ĉi kongreso prezentos tre oportunan okazon forte progresigi nian lingvon, se ni penos konvene konatigi la kongresanojn kun lingvo internacia entute kaj speciale kun Esperanto. Niaj legantoj scias\*) ke la Aganta Komitato de l' estonta kongreso jam tuŝis la demandon pri lingvo internacia, provis elekti por tiu ĉi celo lingvon *nacian* (francan), kaj la praktiko tuj montris, ke tiamaniere oni ne povas decidi la demandon: oni devis akcepti kun lingvo franca ankaŭ la lingvojn anglan, germanan kaj rusan, t. e. reveni al la sama diverslingveco, kiun oni proklamis esti malhelpo de l' sukceso de internaciaj kongresoj entute kaj de l' moskva kongreso aparte.

Sekve la Aganta Komitato de l' kongreso jam scias, ke 1) la diverslingveco estas malbono kaj multe malgrandigas la signifon de internaciaj kongresoj, kaj ke 2) elekto de ia lingvo nacia ne povas forigi tiun ĉi malbonon. Tiujn ĉi du tezojn oni scias tre bone, ĉar la sperto de l' antaŭa kongreso en Romo pruvis la unuan, kaj la penadoj de l' Aganta Komitato de l' moskva kongreso okulvideble klarigis la duan. *Ni penu aldoni al tiuj ĉi du tezoj la trian: por kongresoj internaciaj oni bezonas ankaŭ la lingvon internacian.*

Kial la komitato mem ne venis al tiu ĉi tezo? Kredeble tial, ke por la plimulto da nunaj kleraj homoj la ideo pri lingvo internacia estas io sovaĝa kaj ridinda. Oni ne kredas, ke ia "arta" lingvo povu esti oportuna kaj facila interkomprenilo; oni kutimis ĉie renkonti nur mokojn pri tiu ĉi lingvo, paroli pri ĝi kun rideto kaj opinii ĝin "ludilo por grandaĝaj infanoj". Eĉ la penso pri tiela forigo de l' diverslingveco ne povis veni en la kapojn de l' homoj seriozaj.

\*) Vidu N: o 4 de "L. I." 1896.



Ni montru al la homoj seriozaj la veran indon de nia "ludilo". Ni montru ĝin konvinke, praktike, prezentinte al ili modelojn de la lingvo kaj sciigojn pri ĝi tiam, kiam ili per propraj okuloj vidos la malbonon de l' diverslingveco, t. e. en la kongreso mem. Ĉion, kion ni diros pri la lingvo, ni plifortigu per la atestoj de homoj konataj kaj kredindaj.

S-ro *Kazi-Girej*, kiu la unua proponis prezenti nian lingvon antaŭ la kongreso, verkis nun tre bonan, konvinkan kaj sufiĉe mallongan alvokon al la kongresanoj, proponante al ili ekzameni la demandon pri lingvo internacia kaj turni la atenton al Esperanto. Estas necese *eldoni* tiun ĉi alvokon en la lingvoj angla, franca, germana kaj rusa kaj ricevi la permeson por *disdoni* ĝin al la kongresanoj.

Por eldoni la verketon oni bezonas malmulte: la tuta verko ne okupos pli ol duonon da presa folio kaj ne devas esti presata en granda nombro da ekzempleroj. Se ni presos po 1,000 ekz. en ĉiu lingvo, tiam la tuta eldonado postulos ne pli ol 200 fr. La kvaronon de tiu ĉi sumo ni jam havas.

La permeson disdoni la verkon en la kongreso elklopodos la societo "Espero" en S.-Peterburg.

Sekve la tuta entrepreno estas tre facile efektivebla. Ĉar ĝia graveco estas granda, la okazo estas tre oportuna, ni ne dubas, ke la esperantistoj volos helpi efektivigi la entreprenon. Tial ni nin turnas al ili kun humila peto subteni la gravan aferon per malgrandaj monaj oferoj.

La esperantistaro en Odeso administras la aferon. La monon oni povas adresi al s-ro V. Gernet (Odessa, Puŝkinskaja, 44).

Por ke la alvoko estu pli efika, ĝi devas esti subskribita de personoj pli-malpli konataj, havantaj ian difinitan situacion societatan. Ni nin turnas tial al ĉiuj esperantistoj, kiuj posedas tiun ĉi econ (al ĉiuj doktoroj, pastroj, inĝenieroj, advokatoj, redaktoroj kaj kunlaborantoj de ĵurnaloj, instruistoj, verkistoj, komercantoj k. t. p.) kun humila peto, ke ili permesu meti ilian subskribon post la alvoko. Tiam la alvoko mem fariĝos pli atentinda kaj kredinda por la homoj, kiuj nenion scias pri lingvo internacia.

Se iu ne konsentas doni sian subskribon nur ĉar li *ne scias precize la enhavon* de l' alvoko, la odesa esperantistaro volonte sendos al li plej detalajn sciigojn.



## Kapitalo de d-ro Zamenhof.

Mia alvoko al la esperantistoj, presita en la decembra numero de "Lingvo Internacia", elvokis tre multajn leterojn kaj preskaŭ ĉiutage mi ricevas novajn el diversaj flankoj de l' mondo. Ĉar ĝis nun mi ne ricevis *ĉe unu* leteron *kontraŭ* mia propono, ĉar multaj esperantistoj promesas monon (ĝis nun estas promesitaj jam pli ol 400 frankoj) kaj kelkaj sendis kaj donis ĝin al mi \*), — mi povas rigardi mian proponon kiel akceptitan kaj la kapitalon de d-ro Zamenhof kiel ekzistantan.

Restas al ni krei regularon, kiu gvidos la uzadon de tiu ĉi kapitalo, kaj elekti la administracion.

Sed tio ĉi estas afero, kiu koncernas *ĉiujn esperantistojn*, dezirantajn

\*) Vidu malsupre.



partopreni en la kreado de l' kapitalo. La demando pri la regularo kaj pri la administracio devas sekve esti decidita *per komuna voĉdonado*.

La regularo, ŝajnas al mi, povas esti tre mallonga. Ĝi difiniĝas ĉefe per la esenco de mia propono. Por rapidigi la aferon mi proponas projekton de ĝi:

1. "La kapitalo de d-ro Zamenhof" estas difinita por eldonado de lernolibroj kaj vortaroj de la lingvo Esperanto, proponita de d-ro Zamenhof en la jaro 1887.

2. "La kapitalo de d-ro Zamenhof" formiĝas el la oferoj de esperantistoj kaj el la enspezoj por la vendataj libroj.

3. Ĉiuj libroj, eldonataj kun helpo de tiu ĉi kapitalo, devas esti antaŭ la presado zorge korektitaj de homoj kompetentaj en la lingvo Esperanto kaj en la lingvo de la nacio, en kies lingvo ili estas skribitaj.

4. Ĉiu libro, eldonita per tiu ĉi kapitalo, devas porti sur la titola paĝo la surskribon: *eldonita per la kapitalo de d-ro Zamenhof*.

5. La administrado de "la kapitalo de d-ro Zamenhof" apartenas al... La administracio elektas la verkojn presotajn, gvidas la presadon, difinas la prezon de la libro kaj la rabaton ĉe ĝia vendado.

6. Ĉiujare en la januara N:o de "Lingvo Internacia" la administracio publikas la kalkulan raporton pri la "kapitalo de d-ro Zamenhof". La raporto devas enhavi sciigojn pri la kontanta mono, kiu estas en la kaso ĉe la fino de l' jaro, pri la nombro kaj nominala kosto de la libroj nevenditaj, pri la nombro kaj kosto de la venditaj libroj, pri ĉiuj oferoj kaj oferintoj kaj pri ĉiuj libroj, eldonitaj dum la pasinta jaro.

7. Se la... (administracio) pro iaj cirkonstancoj ne povas daŭrigi la administradon, ĝi devas tuj aranĝi voĉdonadon por elekti la novan administracion kaj transdoni al ĝi ĉiun havon de "la kapitalo de d-ro Zamenhof".

8. Tiu ĉi regularo povas esti ŝanĝata sole per komuna voĉdonado de esperantistoj. La ŝanĝo estas akceptata, se en la voĉdonado partoprenos ne malpli ol 300 esperantistoj kaj se ne malpli ol 200 voĉoj estos por la ŝanĝo.

Se iu trovas, ke tiu ĉi regularo ne estas sufiĉa aŭ enhavas ion nebezonzan, mi petas lin skribi pri tio kiel eble plej rapide *al la redakcio de "Lingvo Internacia"* (Svedujo, Uppsala. Klubo Esperantista). Li devas mallonge kaj klare esprimi, kio al li ne plaĉas kaj kion li proponas. La ricevitaj proponoj estos metitaj sub voĉdonado. Se neniam proponoj venos, mia projekto ĉesos esti projekto kaj fariĝos regularo.

Sole la punkto 1-a ne devas esti *prijuĝata*, ĉar ĝi koncernas la esencon de mia propono, kiu jam estas akceptita.

Restas ankoraŭ elekti la administracion.

En la leteroj, kiujn mi ricevis, oni proponis kiel gvidantojn la sekvantajn personojn kaj personarojn:

- |  |  |
|--|--|
| 1. D-ron <i>L. Zamenhof</i> .                              | 5. La Esperantistan Klubon en Uppsala. |
| 2. S-rojn <i>L. de Beaufront</i> kaj <i>René Lemaire</i> . | 6. La societon "Espero" en Peterburg.  |
| 3. S-ron <i>A. Zakrjevski</i> .                            | 7. La Odesan esperantistaron.          |
| 4. Eldonantojn de la Biblioteko.                           |  |

Inter tiuj ĉi personoj kaj societoj oni devas sekve elekti la administrantojn.



Ĉiu esperantisto, kiun interesas la demando pri la kapitalo de d-ro Zamenhof, volu sendi eble plej baldaŭ post la tralego de tiuj ĉi linioj al la redakcio de "Lingvo Internacia" en Uppsala sian voĉon por unu el la nomitaj personoj kaj societoj. Ĉiuj, kies voĉoj estos ricevitaj ĝis la 1-a de majo 1897, estos nomitaj en la maja numero de "Lingvo Internacia" kaj kiu ricevos la absolutan plimulton da voĉoj, tiu estos proklamita kiel administranto.


Se okazos, ke laŭ kelkaj punktoj estos ricevitaj egalaj nombroj da voĉoj, tiam la personoj aŭ societoj, ricevintaj plej grandan nombron da voĉoj, estos metitaj sub nova voĉdonado.

Por faciligi la decidon, mi volas ankoraŭ rimarki, ke laŭ la tre vera rimarko de la redakcio al mia propono, la administranto-societo estas preferinda antaŭ aparta persono. Mi nur ne povas konsenti, ke la administrado de la kapitalo estu konfidita al la eldonantoj de la Biblioteko, ĉar 1) ili loĝas en diversaj lokoj, kaj tiu ĉi cirkonstanco nepre malrapidigus ĉiun agon de l' administracio, kaj 2) eldonanto de la Biblioteko povas fariĝi ĉiu, kiu oferos 25 fr. ĉiujare, dume por gvidi la uzadon de la "Kapitalo de d-ro Zamenhof" oni bezonas ion ekster 25 frankoj: kapablon, energion kaj sciojn. Komprenoble mi ne deziras per tio ĉi ofendi la eldonantojn de la Biblioteko, ĉar mi parolas ne pri tio, kio *estas*, sed pri tio, kio *povas esti*, — kaj konfidante la kapitalon ni devas ĉion antaŭvidi. — La odesa esperantistaro ankaŭ ne povas esti elektata nun, kiam ĝi ne prezentas oficialan societeton: la cirkonstancoj povas ja iel subite ŝanĝiĝi kaj Odeso povas resti sen esperantistoj. La odesa esperantistaro prezentas nenian tutajon, kaj se ĝi estus elektita, ni mem ne sciuz, kiun ni elektis.

Ni memoru ankaŭ, ke d-ro Zamenhof ĉesis eldonadi la Bibliotekon interalie *pro manko da libera tempo*, kaj ne estus bone ŝarĝi lin per la nova komisiono.

Fine mi denove petas ne prokrasti la aferon kaj voĉi plej baldaŭ, por ke en la fino de tiu ĉi jaro ni povu prezenti al d-ro Zamenhof almenaŭ unu libron, eldonitan per la kapitalo de lia nomo.

V. Gernet.



## La lingvo Esperanto en la servo de ĵurnalismo.

De s-ro P. K. Toksvig ni ricevis la sekvantan artikolon, al kiu ni atentigas ĉiujn niajn legantojn:

Unu tagon, starante en ia librejo tie ĉi en la urbo kaj rigardante la elirintajn librojn, mi okaze trovis la Jarlibron de l' Dana Turista Societo por 1897. Mi "foliis" en ĝi — kion mi vidas? "Esperanto kiel turista lingvo, libere prilaborita laŭ Valdemar Langlet." Kio ĝi estas? Esperanto kia do lingvo estas — tion mi volus vidi! Mi legis la artikolon kun plej granda intereso. Jen estas precize lingvo por redaktoro, mi pensis; tiun mi devas lerni. Pensita — farita, kaj jen mi estas fervora esperantisto.

Min tuj frapis, ke tiu internacia lingvo devas esti uzebla, kun granda utilo, en la servo de ĵurnalismo kaj samtempe de popola instruado. Unu el niaj poetoj en Danujo — M. Goldschmidt — diris la veraĵn vortojn: "Kiam oni nutras l' animon per vero kaj justo, kreskas ĉe ĝi la flugiloj." Milionoj da homoj ricevas parton da ilia spirita nutraĵo per la gazetaro, kaj tial estas



la devo de ĉiu gazetisto meti sur la ĵurnalismo la plej eble puran stampon de vero kaj justo. Erari estas homa, kaj neniu estas certa por ne juĝi malĝustan juĝon; sed neniu *gentleman* rifuzos migri la vojojn kiuj kondukas al la plej bona kompreno de l' vivo kaj pensado de la kun-homoj. Ŝajnas al mi, ke *Esperanto* estas unu el tiuj vojoj kaj hodiaŭ mi riskas ĝin ekiri, permesante al mi prezenti la sekvantan

### Proponon

*al la esperantistoj en ĉiuj landoj.*

Se vi volas sendi al mi korespondaĵojn por la gazeto, kies redaktoro mi estas, mi sendos anstataŭ al vi korespondaĵojn. Se vi mem ne estas direktoro de unu gazeto, vi tamen sendube estos bonvenita kun ili ĉe iu redaktoro, kiam vi ilin tradukis en via propra lingvo kaj prezentas al li por uzado en lia gazeto. La korespondaĵoj devas ĉiam esti skribitaj en Esperanto kaj ambaŭflanke ni zorgas ke ili estu tradukitaj konscienceme. Ĉe ĉiu artikolo estos presita: *Korespondajo en la lingvo internacia Esperanto el...* (la nomo de l' loko). La nomo de l' aŭtoro estos — se oni deziras — severe kaŝita.

En tiu ĉi maniero mi esperas, ke estos eble por unu popolo veni en direkta komunikiĝo kun alia kaj ke tiel fariĝos vera kompreniĝo.

Mi estas preta por komenci. Se mi prosperas, sendube sekvos aliaj gazetoj. Ni montru al ili la vojon!

**P. K. Toksvig,**

Redaktoro de "Nykjöbings Venstreblad",  
Nykjöbing, Sjælland. *Danujo.*

\* \* \*

Al tiu ĉi propono de s-ro Toksvig ni povas nur aldoni, ke ni ĝin plene aprobas kaj opinias ĝin gravega — en vero, se ĝi efektiviĝos, unu el la plej gravaj paŝoj antaŭen, kiujn faris nia juna lingvo. Praktike uzata, ĝi estos akceptita de ĉiam pli kaj pli multaj ĵurnalistoj, kaj ni havos la propagandistojn la plej bonajn en nia tempo. — La propono de s-ro Toksvig estas ankaŭ signifa kiel veninta el lando, ĝis nun malmulte aprobinta nian lingvon. Ni konsilas al niaj legantoj turni plej gravan atenton al ĝi.

*La red.*

—>•<—

## Novajoj.

### Oferado kaj propagandado.

— Por la *Kapitalo de d-ro Zamenhof* ni ricevis la sekvantajn oferojn: de s-ro *Ellert Johnson* (Pilkrog, Jerna, Svedujo) — 7,12 rubl., de s-ro *S. Satunovski* (Odessa) — 10 rublojn, de s-ro *A. Kofman* (Odessa) — 1 rublon, de s-ro *A. Andrejev* (Odessa) — 1 rublon, de s-ro *V. Gernet* (Odessa) — 10 rublojn, s-ro *N. Kazi-Girej* (Borisoglebsk, Rusujo) — 3 rublojn, de s-ro *P. M. Cvetkov* (Aleksandropol, Rusujo) — 2 rublojn, de s-ro *H. J. Spiridonov* (Mcensk, gub. de Orel, Rusujo) — 0,50 r.

— Por la celoj de nia afero oferis al d-ro Zamenhof la sekvantaj per-



sonoj: *M. Smolin* — 1 r. 10 k., s-rino *M. S.* — 0,40 r. kaj s-ro *Jón Jónsson* — 0,50 r. Tiun ĉi monon d-ro Zamenhof transsendis al s-ro Gernet.

— S-ro *A. Naumov* oferis ankoraŭ 6 rublojn por la ilustracioj en nia gazeto (vidu N:º 1, paĝo 4). Koran dankon!

— S-ro *I. P. Timin* (Niĵni-Novgorod. Sormovski meĥaniĉeski zavod) oferis 3 rublojn por eldono de l' Sankta Evangelio. S-ro *P. Cvetkov* sciigas nin ke li abonas 5 ekz. de l' libro, kiam ĝi eliros. Koran dankon!

— D-ro *Andrĵejevski* (Kobrin, gub. de Grodno) oferis 4 r. 06 k. por vastigado de nia lingvo.

### Biblioteko.

— Eldonantoj de Biblioteko fariĝis ankoraŭ sekvantaj personoj: *N. A. Kazi-Girej* (Borisoglebsk, Rusujo) — 10 rubl. ĉiujare, kaj la *esperantistoj de Krasnojarsk*, kiuj ofertas al la Biblioteko 1 % el siaj enspezoj.

### Nova literaturo.

Eliris el la presejo la *Kanto al la flago de paco*, pri kiu ni raportis en nia deca n-ro de l' pasinta jaro. La kompositoro de l' kanto estas la membro de l' Reĝa sveda Akademio de sciencoj, s-ro majoro *Cl. Adelsköld*, kiu jam dum longa tempo montris sian intereson por nia lingvo — li ja estas konata inter ĉiuj esperantistoj kiel aŭtoro de l' muziko por nia *Himno*. S-ro *Adelsköld* kiu estas honora membro de l' Klubo esperantista en Uppsala, ankaŭ nun afable, donis helpan manon al nia laboro, pagante la tutan eldonon de la verko kaj donacante ĉiujn presitajn ekzemplerojn (500) al nia klubo. Koran dankon! Ke la ekzemplo trovu imitantojn! Nia literaturo tiel kreskus rapide.

La kanto kiu estas aranĝita por kvar viraj voĉoj (de *B. Fexer*) estas tre rekomendinda al niaj amikoj. La kosto de ekzemplero estas kr. 0,25 = rub. 0,15 = fr. 0,40 = markoj 0,30. Rabaton ĉe aĉeto de kelkaj ekz. Oni ricevas la verkon el la Klubo esperantista, *Uppsala*. (Svedujo).

La 15 de Februaro tiun ĉi jaron mortis trankvile en sia hejmo pastro *P. L. Stenborg* en Pajala, kredeble la plej norda esperantisto en la mondo. Pajala estas en Svedujo tie, kie konfluas la Torneå kaj la Muonio riveroj, 170 kilometroj norde de Haparanda.

Multjara malsano, kiu lin tenis en la lito, kaj ankaŭ malbonaj ekonomiaj aferoj malpermesis lin multe labori por nia lingvo, li eĉ ne povis pro la tremado de l' mano skribi respondi al la senditaj al li esperantaj leteroj.

Mi trovas esti mia devo anonci lian morton al amikoj esperantistaj, ĉar li estas la altirinta min al nia kara afero.

Pacon al lia polvo!

Korpilombolo 15 Marto 1897.

*Otto W. Zeidlitz.*

— Librojn esperantistajn oni vendas en *S. Peterburgo* ankaŭ en la librejo de l' gazeto "Novosti", Bolŝaja Morskaja 17. En *Uppsala* ĉe *Lundequistiska bokhandeln* kaj *Akademiska bokhandeln*. En *Stockholm* ĉe *Fritzes bokhandel*, *Gustaf Adolfs torg*, kaj ĉe *Samson och Wallin, Drottninggatan*.



— S-ro M. M. Abesgus (Rusujo, Baku, Kavkaz, Kievski Promiŝlenni Bank) promesas sendi senpage kaj *franke* tri diversajn *persajn poŝtsignojn* al ĉiu, kiu sendos al li sian adreson *en Esperanto* kaj 25 centimojn = 10 kopekojn en poŝtsignoj\*) enmetitajn en oficialan poŝtokoverton de sia lando. Kiu volas ricevi la poŝtsignojn en oficiala rusa koverto, volu skribi pri tio.

\* \* \*

La 12/24 de marto estos en S.-Peterburg, en "Soljanoj Gorodok" raporto de s-ro *Postnikov*, membro de la societo "Espero", pri lingvo internacia entute kaj pri la lingvo "Esperanto" speciale. Tiu ĉi raporto sendube multe progresigos nian lingvon en S.-Peterburg.

**Pri la lingvo Esperanto parolis**, inter aliaj, la sveda gazeto *Karlstadstidningen* en sia n:o 1821 de l' pasinta jaro. En artikolo sufiĉe longa kaj interesa. sub la titolo *Esperanto, lingvo por ĉiuj*, raportigas pri la nova sveda lernolibro de P. Nylén kaj la artikolo de V. Langlet, "Esperanto kiel turista lingvo" (en la Jarlibro de l' sveda turista societo, 1896). La artikolo tre simpatia al nia lingvo finiĝas tiel:

"Legante tiujn ekzemplojn de *sperto* — ĉu oni povas ne senti iom de l' entuziasma antaŭsento, kiun vekas la grandaj vidoj de l' estonteco? Ĉu ne tiu lingvo, konstruita de homa fantazio kaj homa penso laŭ la granda leĝo de l' *fortoŝparado*, ĉu ĝi ne estas necesa plenumaĵo al la grandiozaj eltrovoj por la komunikacio, kiuj en nia tempo eksolvis la popolojn el ilia disiĝo unu de la alia, kaj malkovris eblecojn por proksima komunikado inter antipodoj, kiuj antaŭ cent jaroj kvazaŭ nur en fabelo ekzistis unu por la alia! Kaj kiam la 20:a centjaro iam atingis la plej grandan kulturalan celon, kiu ĝis nun montriĝis por la okuloj de l' filantropo — tiun disvastigi en la "profundaj vicoj" de l' popolo la fondaĵoj de civilizacio, kiujn kreis homa genio kaj homa laboro — ĉu ne estas tiam nature, ke la diversaj nacioj anstataŭ vane malŝparigi tempon kaj forton por lerni la lingvon de aliaj, anstataŭ la antikveca, forto-elĉerpanta poliglotismo, kontentiĝas per la patrolingvo en sia patrolando kaj por uzado eksterlande alprenas al si la simplan, *por ĉiuj komunan* Esperanton, tiun belan lingvon, kiu portas l' *esperon*. l' estontecon jam en sia nomo!"

*Norrbottens Kuriren* en N:o 171 de l' pasinta jaro enhavis "letero el Varsovio" kiun skribis sinjoro J. Wasniewski kaj tradukis s-ro O. W. Zeidlitz; en la N:o 35 de tiu ĉi jaro noticon pri la morto de s-ro J. Wasniewski kaj samtempe lian biografion kaj mallongan sciigon pri nia lingvo (skribitan de l' redakcio). Pro tiu ĉi lasta s-ro Zeidlitz estas de multaj demandata pri Esperanto.



## Pli bone nenion ol tian ion!

En la antaŭa numero de "Lingvo Internacia" estas presita la unua artikolo kontraŭ la ortografia skribado de l' nomoj propraj. Kelkaj paradoksoj, kiujn mi trovis en la artikolo, igis min ankaŭ preni la plumon kaj partopreni en la demando, kvankam mi tute ne sentas min kompetenta ĝin solvi.

La aŭtoro de la artikolo, s-ro Borovko, estas malamiko de l' ortografia skribado de l' nomoj propraj nur tial, ke multaj alilandanoj ne povus regule tralegi la nomojn tiel skribitajn. Li nomas "barbarismo" la neregulan legadon de l' nomoj kaj eĉ diras: "se vi rifuzas elparoli ilin, tiuj ĉi nomoj estas per vi neekzistantaj; oni povas skribi ilin per ĥinaj literoj aŭ simple per punktoj; en ĉiuj tri okazoj la rezultato estos la sama."

Tion ĉi mi absolute ne povas konsenti.

Se estas vere, ke la nomoj propraj ekzistas nur por povi diferencii inter unu persono kaj aliaj, unu loko kaj aliaj k. t. p., t. e. por noti precize

\*) Por la poŝta transsendo.



ian personon, urbon, riveron k. t. p., tiam sendube tia maniero de skribado estas la plej oportuna, kiu donos la eblon pli precize signi la difinitan objekton, por ke oni povu ĉiam eviti la miksaĵojn kaj nekomprenajojn. Tion ĉi ĉiu konsentos.

Sekve la demando: “kiel skribi la nomojn proprajn?” egalas por ni la demandon: “kia maniero de skribado donos la eblon evitadi nekomprenajojn kaj ĉiam precize noti la objekton, pri kiu oni parolas?”

La artikoloj de s-ro René Lemaire kaj Gaston Moch montris jam sufiĉe klare, ke la fonetika skribado de l' nomoj propraj estas tre ofte *neebla*. Tion ĉi ŝajne konsentas ankaŭ s-ro Borovko kaj proponas tial “barbarigi” la nomojn proprajn por doni al ĉiu la eblon elparoli ilin . . . neregule. Mi volonte akceptus tiun ĉi proponon, se mi povus esti certa, ke oni ĉiam “barbarigos” la nomon, kiu ne povas esti skribata fonetike, en tiu sama maniero. Bedaŭrinde tiu ĉi certeco mankas absolute, kaj mi povus tie ĉi citi tre multajn ekzemplojn, kiuj klare montras la veran indon de l' fonetika skribado.

Se la glora franco *Regnault* povus scii, ke iaj rusoj faris el li multajn homojn, li kredeble ne estus kontenta, kvankam liaj sciencaj laboroj sufiĉus por glorigi eĉ dekon da homoj: en diversaj rusaj libroj kaj ĵurnaloj oni lin nomis: *Regnolt*, *Regnault*, *Regno*, *Renjo*, *Renjolt* . . . La sama sorto atingis la anglon *Graham*, kiun la rusoj scias sub la nomoj: *Gragam*, *Gregem*, *Gram*, *Grem* kaj mi havis la okazon konvinkiĝi, ke multaj el niaj kleruloj estas konvinkitaj, ke *Gragam*, *Gregem* kaj *Grem* estas diversaj personoj. Eble la nunaj astronomoj en Parizo, la fratoj *Henry* ne suspektas, ke ili estas en Rusujo *Anri* kaj *Genri*, eble al la nuna lumilo de l' scienco ĥemia estus ankaŭ interesa scii, ke li estas *Bertlo* kaj *Bertelo* kaj *Bertelot*, eble . . . sed mi povus plenigi multajn paĝojn per similaj ekzemploj . . .

Kredeble s-ro Borovko diros, ke tiu ĉi miksaĵo devenas de la nesciado de l' skribantoj kaj tradukantoj, ke oni devas iel komune “barbarigi” la geografiajn kaj historiajn nomojn, krei specialan vortaron de ili kaj devigi ĉiujn esperantistojn uzadi ilin en tiu “barbarigita” formo. Tion ĉi mi volonte konsentus, se ĝi estus facile plenumbla kaj oportuna, sed mi pensas, ke tiu ĉi laboro estas tre malfacila kaj senutila. En la franca vortaro de *Boiste* (Paris 1843) mi trovas 9,000—10,000 da nomoj de l' personoj rimarkindaj kaj preskaŭ tiom da nomoj geografiaj, kaj iafaje mi vane serĉas ian nomon en tiu ĉi vortaro. La laboro de l' “barbarigantoj” estus sekve grandega.

Sed ni eĉ supozu, ke la “barbarigantoj” de l' nomoj propraj estas neordinare laboremaj kaj ke ilin ne timigos 20 miloj da vortoj. Oni povas tamen antaŭvidi en ilia laboro serion da malfacilaĵoj nevenkeblaj.

La preciza elparolo de multaj nomoj propraj estas por ni tute nekonata. Kion ni faros ekzemple kun *Ἡρακλείων*, *Δημήτριος*, *Βοηθός* k. a.? Kion ni faros plue kun *Klein*, *Maier*, se la germanoj mem elparolas tiujn ĉi nomojn *Klejn* kaj *Klajn*, *Majer* kaj *Majr*? Kion ni faros fine kun la nomoj de tiuj personoj, kiuj en niaj okuloj fariĝas historiaj, kiel *Rayleigh*, *Ramsay*, *Röntgen*, *Andrée*, *Nordenskiöld*, *Moissan*? Kredeble ni devos krei ian specialan komitaton, kiu senĉese “barbarigos” ĉiun novan genion, aperintan inter la homoj, por ke li ne povu rekoni sian propran nomon en niaj verkoj. Tiam la problemo estos plene solvita por s-ro Borovko.

Sed mi vere ne komprenas, kial nia estimata amiko volas aperigi tiun ĉi amason da “barbarismoj” kaj serion da malfacilaĵoj. Ĉu efektive la apostolo de nia lingvo en Ameriko iel pliboniĝis, kiam s-ro Borovko komencis



nomi lin *Geĥegan* anstataŭ legi *Geoghegan*? Por mi ekzistis, ekzistas kaj ekzistos s-ro *Geoghegan*, li ekzistus por mi, se mi eĉ povus elparoli *nenian* literon de lia nomo, kiel li ekzistas por mutaj kaj surdaj, se tiaj personoj ekzistas inter liaj korespondantoj.

S-ro Borovko eraras, kiam li pensas, ke la lingvo fariĝos pli facila, se ni "barbarigos" la nomojn proprajn. Tute ne! Laŭ la esenco de lingvo internacia ni devas pli ofte legi nomojn ol elparoli ilin, ĉar la leteraj komunikigoj de diverslandanoj estas multe pli oftaj ol la buŝaj, — kaj por ĉiu la ortografio de l' nomoj propraj estas pli konata ol ilia elparolo, ĉar li ofte vidas tiujn ĉi nomojn en libroj, gazetoj, leteroj kaj tre malofte povas aŭskulti, kiel oni elparolas ilin. Sekve ĉiam estas pli facile regule skribi ian nomon ortografie, ol fonetike. Se mi ne scias elparoli ian nomon, mi vere faras "barbarismon", sed tiu ĉi barbarismo havas tre bonan econ: ĝi malaperas tuj, kiam mi fermas la buŝon: ĝi ekzistas nur dum unu momento. Se mi barbare skribos ian nomon, mi faros barbarismon, kiu ekzistos tiel longe, kiel ekzistos la skribaĵo, kaj la skribaĵoj ofte estas mirinde longtempe ekzistantaj. Sekve se mi nepre devas elekti inter du barbarismoj, se la barbarismoj ne estas bono, mi ĉiam elektos el ili la plej morteman.

Estas nun klare, ke ne la ortografia skribado emas konstrui la turon de Babilono, sed la fonetika. Se oni skribos ortografie, oni skribos *tute difinite*, ĉar la plej granda parto da nomoj propraj havas ĉiu nur unu manieron de skribado: — *Shakespeare*'oj ne estas multaj, — dume la fonetika skribado povas aperigi *kelkajn formojn* de l' sama nomo, tute kiel ĉe la Babilona malfeliĉo aperis kelkaj nomoj por ĉiu objekto, — kaj, mi diras sincere, mi preferas nenion, ol tiun ion, kiun al ni proponas s-ro Borovko.

V. Gernet.

## Memmortigoj.

Rakonto de **Guy de Maupassant**.

*Al George Legrand.*

Preskaŭ ĉiun tagon oni povas legi en gazeto, en rubriko de diversaj faktoj, la sekvantan: "En la nokto inter merkredo kaj ĵaŭdo, la loĝantoj de la domo N. 40 en la strato... estis revokitaj per du pafoj unu post al alia. La bruo eliris el loĝejo de s-ro X. La pordo estis malferrmita, kaj oni trovis lin naĝantan en lia sango, kun la revolvero ankoraŭ en la mano, per kiu li sin mortigis.

"S-ro X. estis de 57 jaroj, ĝuis sufiĉan bonhavigon kaj havis ĉion por esti feliĉa. La kaŭzo de lia malgaja decido estas tute ne konata."

Kiaj profundaj doloroj, kiaj koraj ĉagrenoj, kiaj kaŝitaj malesperoj, kiaj vundoj bruligantaj devigas tiujn-ĉi homojn sin mortigi, homojn, kiuj estas feliĉaj? Oni serĉas, oni elpensas dramojn de amo, oni suspektas malŝparon de mono, kaj ĉar oni ne povas trovi ion precizan, oni metas je tiuj-ĉi mortoj unu vorton: "Mistero."

Unu letero, trovita en la tablo de unu el tiuj-ĉi "memmortigintoj sen kaŭzo" kaj skribita en la lasta nokto ĉe la ŝargita pistolo, okaze enfalis en niajn manojn. Ni ĝin opinias interesan. Ĝi ne parolas pri grandaj katastrofoj, kiujn oni serĉas ĉiam post tielaj agoj de malespero, ĝi nur montras



la malrapidan sekvon de l' malpacajoj de l' vivo, la fatalan detruon de l' unu sola ekzistajo, kies revoj malaperis; ĝi klarigas tiujn-ĉi tragikajn finojn, kiujn povas kompreni nur homoj nervaj kaj sentemaj.

Ĝi estas:

Noktomezo. Post finigo de tiu-ĉi letero, mi min mortigos. Kial? Mi penas tion-ĉi respondi, ne por tiuj, kiuj legos tiujn-ĉi liniojn, sed por mi mem, por refortigo de mia falanta kuraĝo, por bone penetrigi per la neceso, nun jam fatala, de tiu-ĉi akto, kiu povis esti nur prokrastita.

Mi estis edukita de gepatroj simplaj, kiuj kredis je ĉio. Kaj mi kredis, kiel ili.

Mia revo daŭris longtempe. Nun sole disŝiriĝis la lastaj ĉifonoj.

Jam dum kelkaj jaroj unu fenomeno fariĝas en mi. Ĉiuj aperoj de l' ekzisto, kiuj iam brilis antaŭ miaj okuloj, kiel ĉielruĝoj, ŝajne sin malkoloras. La signifo de l' objektoj aperis en sia bruta realeco, la vera kaŭzo de l' amo abomenigas por mi mem la poetajn ĝojojn.

Ni estas ludiloj eternaj de malsaĝaj kaj ĉarmaj revoj, kiuj ĉiam renoviĝas.

Kaj tiel, malĵuniĝante, mi jam paciĝis kun tiu-ĉi terura mizero de l' objektoj, kun la senfrukteco de penoj, kun vaneco de l' atendoj, — kiam unu nova lumo pri la malgrandegeco de ĉio aperiĝis por mi hodiaŭ post la tagmanĝo.

Iam, mi estis gajulo! Ĉio min ravis: la virinoj pasantaj, la vido de la stratoj, la lokoj, kie mi loĝis; mi eĉ interesiĝis je formo de miaj vestoj; sed la ripeto de l' samaj vidiĝoj fine komencis plenigi mian koron per laceco kaj enuo, kiel sentas tion-ĉi teatrano, enirante ĉiun vesperon en la saman teatron.

Jam tridek jarojn mi min levas ĉiutage en la sama horo, jam tridek jarojn mi manĝas en la sama restoracio la samajn manĝojn, kiujn al mi alportas nur malsamaj kelneroj. Mi provis vojaĝi. La soleco, kiun oni sentas en lokoj malkonataj, terurigas min. Mi min sentis tiel sola sur la tero, kaj tiel malgranda, ke mi rapidis preni revojn.

Sed tie-ĉi la neŝanĝita fizionomio de mia meblo, kiu jam tridek jarojn restis sur unu placo, la uzeco de miaj seĝoj, kiujn mi konis ankoraŭ novajn, la odoro de mia loĝejo (ĉar ĉiu loĝejo kun la tempo ricevas specialan odoron) ĉiuverspere min alkondukas ĝis naŭzo de kutimoj kaj ĝis nigra melankolio de tiel vivi.

Ĉio tiel konstante kaj mizere estas ripetata. Eĉ la maniero de l' enmeto de la ŝlosilo ĉe mia reveno hejmen, la loko, kie mi trovas ĉiam miajn alumetojn, mia unua rigardo en mia ĉambro, kiam la fosforo enflamiĝas — ĉio tio-ĉi donas al mi la deziron min elĵeti el la fenestro kaj tiel fini kun tiuj-ĉi monotonaj agoj de l' vivo, de kiuj ni neniam liberiĝos.

Ĉiun tagon, ĉe la razo mi elprovas la deziregon tranĉi mian gorĝon, kaj mia fizionomio, ĉiam tiu sama, kiun mi vidas en la malgranda speguleto kun la savono sur la vangoj, devigis min kelkajn fojojn plori pro malgajeco. Mi eĉ ne povas resti kun homoj, kiujn mi iam renkontadis — tiel mi ilin konas, tiel mi scias, kion ili diros al mi kaj kion mi al ili respondos, tiel mi vidas la formojn de iliaj pensoj nemoveblaj, la fleksojn de iliaj konsideroj. Ĉiu cerbo estas cirko, kie eterne kuras enfermita malfeliĉa ĉevalo. Kiuj ajn estus niaj penoj, niaj turnoj, niaj kroĉoj, ĉiam la limo estas proksima kaj alrondita ĉiam kaj ĉie, sen neantaŭviditaj elstaroj kaj sen pordo en la nekonata. Kaj oni devas turniĝi, eterne turniĝi en la samaj ideoj, samaj ĝojoj, samaj ŝercoj, kutimoj, kredoj, abomenaĵoj.



Hodiaŭ vespere estis terura nebulo. Ĝi kovris la bulevardon, kie la gasaj kornetoj estingiĝantaj ŝajnis fumantaj kandeloj. Unu ŝarĝo, pli forte, ol ordinare, pendis sur miaj ŝultroj.

Kredeble — mi digestadis malbone.

Ĉar la bona digestado estas ĉio en la vivo. Ĝi donas inspiron al artisto, amajn dezirojn al junuloj, ideojn klarajn al pensuloj, la ĝojon de l' vivo al ĉiu — ĝi permesas multon manĝi (kio estas la plej granda feliĉo). La stomako malsana elvokas skeptikecon, nekredecon, naskigas nigrajn songojn kaj deziron morti. Mi tion-ĉi ofte rimarkis. Kaj povas esti, ke mi min ne mortigus, se mi havus hodiaŭ bonan digestadon.

Kiam mi sidiĝis en la seĝon, kie mi sidiĝas jam tridek jarojn ĉintage, mi rigardis ĉirkaŭ mi, kaj mi eksentis tielan teruran malesperon, ke mi jam pensis, ke mi fariĝas freneza.

Mi serĉis kion fari por forkuri de mi mem. Sed ĉiu okupo min terurigas kiel ankoraŭ pli abomena ol la nenionfarado mem. Tiam mi decidis ordigi miajn paperojn.

Jam longe mi intencis purigi miajn tirkestojn — ĉar dum tridek jaroj mi ĵetas senorde en mian tablon miajn leterojn kaj fakturojn kaj la malordo de tio-ĉi ofte donas al mi enuon kaj zorgon. Sed ĉe la sola penso ion aranĝi mi elprovas tian lacecon moralan kaj fizikan, ke neniam mi havis kuraĝon komenci tiun ĉi abomenan laboron.

Kaj tiel mi sidiĝis ĉe mia skribtablo, malfermis ĝin kun intenco fari elekton el miaj malnovaj paperoj por detrui plimulton da ili.

Komence mi restis frapita antaŭ tiu-ĉi amaso da flavitaj folietoj, sed poste mi prenis unu.

Oh! neniam tuŝu tiun-ĉi meblon, tiun-ĉi tombejon de iamaj korespondoj, se nur vi ŝatas la vivon. Kaj, se vi okaze ĝin malfermas, kaptu per plenaj manoj ĝiajn leterojn, fermu viajn okulojn por ne legi eĉ vorton, por ke la sola jam forgesita sed nove rekonita skribaĵo ne donu al vi eĉ solan rememoron pri l' oceano de suveniroy; portu ilin al flamo — tiujn-ĉi mortemajn paperojn, kaj kiam ili jam estas cindro, ankoraŭ, dispistu ilin en nevideblan pulvoron... aŭ, kontraŭe, vi estos perdita... kiel mi jam estis perdita dum unu horo. Ah, la unuaj leteroj, kiujn mi relegis, min tute ne interesigis. Cetere, ili estis freŝaj kaj estis de homoj vivantaj, kiujn mi renkontis sufiĉe ofte kaj kies alesto min tute ne tuŝas. Sed subite unu koverto devigis min ekstremiti. Unu granda larĝa skribaĵo strekis mian nomon kaj rapide miaj okuloj pleniĝis per larmoj. Tio-ĉi estis mia plej kara amiko, la kolego de mia juneco, la konfidanto de ĉiuj miaj esperoj; kaj li aperis tiel klare antaŭ miaj okuloj, kun sia rideto bonanima kaj kun la mano etendita al mi, ke tremo trakuris en miaj membroj. Jes, jes, la mortintoj revenas — ĉar mi lin vidis. Nia memoro estas mondo pli perfekta, ol la universo — ĝi revivigas tion, kio jam ne ekzistas. Kun la mano tremanta, kun rigardo nebula, mi relegas ĉion, kion li skribis al mi, kaj en mia malfeliĉa ploranta koro mi eksentis tielan doloran vundon, ke mi komencis ĝemi kiel homo, kies membrojn oni rompas.

Tiam mi rememoris mian tutan vivon de ĝia fino ĝis la komenco, kiel oni sin levas laŭ la rivero de ĝia elfluo ĝis la komenco. Mi ekmemoris homojn, jam tiel longe forgesitajn, ke mi eĉ ne scias plu iliajn nomojn: nur iliaj figuroj vivis en mi. En la leteroj de mia patrino mi rememoris miajn maljunajn servantojn, la formon de nia domo kaj la malgrandajn detalojn, sur kiuj haltis la infana impresoj.



Jes, mi subite revidis ĉiujn malnovajn tualetojn de mia patrino kun iliaj diversaj fizionomioj laŭ la modo kaj la frizaĵojn, kiujn ŝi unu post la alia preferis. Ŝi aperis al mi prefere en sia silka vesto kun malnovaj desegnoj kaj mi rememoris unu frazon, kiun ŝi al mi diris unu tagon, portante tiun-ĉi veston: "Roberto, mia infano, se vi ne tenos vin rekte, vi estos ĝiba en tuta via vivo". Kaj poste, malferminte alian tirkeston, mi retrovis miajn amajn memorarojn: unu pantofleton de balo, unu naztukon deŝiritan, eĉ unu ligileton, la sekitajn harojn kaj florojn. Tiam la dolĉaj romanoj de mia vivo, kies heroinoj ankoraŭ vivantaj havas nun la harojn tute blankajn, min trempis en maldolĉan melankolion je l' objektoj, jam por ĉiam finitaj. Ho la junaj fruntoj kun oraj haroj, la premetoj de manoj, la parolanta rigardo, la koroj batantaj, la rideto, kiu promesas la lipojn, la lipoj, kiuj promesas la brakojn... kaj la unua kiso... tiu-ĉi kiso sen fino, pro kiu oni fermigas la okulojn, pro kiu ĉiu penso dronas en nemezurebla feliĉo de proksima posedo.

Prenante per plenaj manoj tiujn-ĉi malnovajn atestojn de malproksimaj karesoj, mi ilin kovrigis per frenezaj kisoj kaj en mia amo, turmentita per la rememoroj, mi revidis ĉiun en la horo de forlaso, kaj mi eksentis terurajn turmentojn pli kruelajn, ol ĉiuj punegoj de l' infero, elpensitaj en fabloj.

Restis ankoraŭ unu letero. la lasta.

Ĝi estis de mia mano kaj diktita al mi jam antaŭ kvindek jaroj de mia instruisto de kaligrafio. Ĝi estis:

"Mia kara patrineto!

Hodiaŭ mi havas sep jarojn. Tio-ĉi estas la aĝo de prudento kaj mi profitas ĝin por vin danki je tio, ke vi donis al mi la vivon.

Via malgranda knabo, kiu Vin adoras

Roberto."

Ĉio jam finita. Mi alvenis al la fonto kaj baldaŭ mi returnos por ekrigardi la reston de miaj tagoj.


Mi ekvidis la maljunecon abomenan kaj izolatan, la proksimajn malfortecojn kaj ĉio jam finita, finita, finita. Kaj neniuj ĉirkaŭ mi!

Mia revolvero estas tie-ĉi, sur la tablo...

Mi ĝin prenas... Neniam relegu viajn antaŭajn leterojn!

Jen kiel sin mortigas multaj homoj, kies vivon oni vane analizas, por tie trovi grandajn ĉagrenojn.

Trad. A. M. Grünfeld.



## Nia lingvo en Islandujo.

Tie ĉi, en malproksima Islandujo, nia lingvo ankaŭ estas konata, kion certe multaj esperantistoj apenaŭ scias. Kaj ĝi jam havas la sekvantan historieton de progreso: Antaŭ ĉirkaŭ kvar jaroj nia afero trovis tie ĉi sian unuan amikon, tre eminentan Islandanon. Li tuj komencis prilabori, kaj jam skribis multe pri Esperanto, li ankaŭ tradukis kelkajn verkojn el nia literaturo, kaj sen ia dubo estus al nia afero grande utila, sed malfeliĉe li mortis iom poste, kaj kun li la tiam atingita vastiĝo, kaj memoro pri nia lingvo. Tri jaroj pasis sen ia provo de revivigo, ĝis mi okaze konatiĝis kun la lingvo, kaj tuj poste fariĝis esperantisto.

Jam nun nia lingvo estas bone konata, almenaŭ tie ĉi en Reykjavik;



en tiu ĉi malgranda urbo, en kiu ĉiu scias pri la aferoj de la alia, ĝi estus al mi preskaŭ neeble (eĉ se mi ĝin dezirus) sekretigi la fakton ke mi estas esperantisto; sendube al la reykjavikaj poŝthelpantoj ne estis malfacile informi, ke mi ricevas poŝtkartojn, kiujn ili devas elsendi nelegitajn de ili. Kvankam la Reykjavikanoj jam bone konas nian lingvon, ili tamen preferas nur konatiĝi kun ĝi, ol varbiĝi kiel regulaj esperantistoj, kvankam ili interesas je la afero, kaj ofte oni min demandas: “ĉu estas vere, ke vi lernis la novan lingvon.” La fino estas, ke ili devas prunti lernolibron, vortareton aŭ ian libron por konatiĝi kun nia lingvo. Tial mia internacia libraro ĉiam estas en elpruntado inter miaj kunurbanoj, kiuj estas, kiel la aliaj Islandanoj, lernama sed kutimema popolo.

Jón Jónsson (Reykjavik).

## Kalkula raporto

pri la eldonado de “Lingvo Internacia” en la jaro 1896.

### I. *Elspezoj.*

1. Presado, papero, bindado, dissendo, presado de adresoj . . .	fr. 2,282,70
2. Permeso eldonadi la gazeton . . . . .	40,38
3. Anoncado . . . . .	34,12
4. Poŝtaj elspezoj de l' redakcio, dissendado de perditaj numeroj k. c. . . . .	254,99
5. Kancelariaj elspezoj . . . . .	8,22
6. Pago por transsendo de oferitaj libroj, resendo de mono superflue sendita k. c. . . . .	31,30
	<u>Kune fr. 2,651,71</u>

### II. *Enspagoj.*

1. Abonpago . . . . .	fr. 1,659,19
2. Anoncoj . . . . .	41,53
3. Oferoj . . . . .	604,01
	<u>Kune fr. 2,304,73</u>

Nia malprofito de l' pasinta jaro estas sekve 346,98 frankoj. La malprofito dependas de la sekvantaj kaŭzoj:

1. De la pligrandigo de l' gazeto. En la jaro pasinta ni donis al la abonantoj 252 paĝojn anstataŭ 192, kiujn ni devis doni. Tio ĉi kaŭzis la superfluajn elspezojn de 600 fr. proksimume.

2. De la tre grandaj poŝtaj elspezoj. Se ni havos en la nuna jaro tiom da abonantoj, kiel en la pasinta, ni povos malgrandigi la poŝtajn elspezojn je 100 fr. proksimume.

Por eviti la malprofiton en la nuna jaro la redakcio decidis: 1) ne pligrandigi la gazeton kaj eldonadi ĉiumonate nur 16-paĝan kajeron. Sole en okazoj eksterordinaraj, kiam ni havos multon da materialo senprokraste presota, ni pligrandigos la numeron. 2) Kiam la stato de l' gazeto estos tute bona, kaj nia “Lingvo Internacia” postulos neniajn oferojn, tiam ni anstataŭ grandigo de l' gazeto difinos la pagon al niaj kunlaborantoj. Nur post tio ni revos pri la pligrandigo de l' gazeto.

**La redakcio.**



## Informejo de esperantistoj.

### Deziras korespondadi en Esperanto:

- S-ro *Jarnovski*, Pavel Avreljanoviĉ. St. Peterburg, Sergievskaja, 17, loĝ 21.  
(Deziras korespondadi kun eksterrusaj esperantistoj.)  
Fr-lino *Jeanne Jamont*. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
Fr-lino *Marie Bretin*. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *Marcel Arnoux*. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *Marcel Bouvier*. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *Paul Gaudillat*, au collège de Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *Adolphe Jaillet*. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *Ch. Dannenmüller*, élève au collège. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.  
S-ro *J. Raymond*, employé aux postes. Louhans (Saône-et-Loire). Francujo.

### Deziras korespondadi kun germanoj kaj angloj:

- S-ro *Albert Heumann*, fil. kand., lerneja instruisto, Holländaregatan 26 B. Stockholm. (Svedujo).

### Deziras korespondadi kun germanoj kaj francoj:

- S-ro *A. B. Fränkel*. Malij prospekt, 47. Rostov na Dov. Rusujo.

### Por informoj en Danujo oni povas skribi en la lingvo Esperanto al

- S-ro *P. K. Tolsvig*, redaktoro de Nykjöbings Venstreblad. Nykjöbing, Sjælland, Danujo.

### Por vizitoj en Lapplandujo (Svedujo) oni sin turnu al

S-ro *Hjalmar Bäckström*, Luleå. Ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras viziti Lapplandujon, volu letere aŭ persone komunikiĝi kun s-ro B. Li senpage donas ĉiujn necesajn sciigojn, li sendas geografiajn kartojn, liveras por la vojaĝoj akompanantojn, kiuj scias Esperanton. Li renkontas apud vaporŝipo aŭ fervojo, se oni sufiĉe frue sciigas pri alveno; li ankaŭ liveras loĝejon. — La adreso nur: *Hjalmar Bäckström*, agento de la lingvo internacia Esperanto, Luleå (Svedujo).

### Agento de la lingvo internacia Esperanto:

10. S-ro *I. Puĉkovski*. Kansk (Jenis. gub.) Rusujo.



## Raporto pri la solvo de la problemo, presita en la N:o 9 de "Lingvo internacia", 1896.

S-ro Ŝatunovski sciigas nin, ke sekvantaj personoj sendis al li la solvojn de la problemo, proponita de li en la N:o 9 de nia gazeto:

S-ro *Avalov* (Tiflis), s-ro *Feldšar* (Nikolajev), s-ro *Collinder* (Sundsvall), s-ro *Goldberg* (Narovl), s-ro *Halling* (Kalmar), s-ro *Kofman* (Odessa), s-ro *Lojko* (Minsk), s-ro *Postnikof* (S.-Peterburg), s-ro *Trompeter* (Schalke).

S-ro Ŝatunovski difinis la premion al s-ro *Ernst Halling*, Kalmar, Svedujo, ĉar ekster tio, ke lia solvo estas tre bona kaj skribita en perfekta Esperanto, li donas ankaŭ la plej komunan formon de la serĉata partumo.

La redakcio petas s-ron Halling sciigi ĝin, kien oni devas sendi la aljuĝitan al li premion.



Solvo de la problemo estas la jena: Ni supozu, ke  $\frac{p'}{q'}$  estas ordinara partumo, kiu povas esti transformita en decimalan partumon pure periodan, enhavantan la nombron  $N$  kiel periodon. Se  $n$  estas la nombro de l' ciferoj de la nombro  $N$ , ni havas:

$$\frac{p'}{q'} = \frac{N}{10^n - 1},$$

ĉar la nombro  $10^n - 1$  estas egala al la nombro, prezentata per la  $n$  fojoj ripetita cifero 9.

La kondiĉoj de la problemo donas ankaŭ la egalecon:

$$\frac{N-2}{10} + 2 \cdot 10^n - 1 = 2N,$$

aŭ

$$\frac{N}{10^n - 1} = \frac{2}{19}.$$

Sekve

$$\frac{p'}{q'} = \frac{2}{19}.$$

Ni supozu nun, ke la decimala partumo, kiu estas egala al  $\frac{p}{q}$ , enhavas  $m$  ciferojn inter la komo kaj la komenco de l' unua periodo. Multobliginte tiun ĉi decimalan partumon per  $10^m$ , ni ricevos nombron, konsistantan el ia tuta parto  $A$  kaj el parto, kiu estas decimala partumo pure perioda, kaj kies periodo estas  $N$ . Ni havas tial:

$$\frac{p}{q} 10^m = A + \frac{2}{19},$$

sekve

$$\frac{p}{q} = \frac{19A + 2}{19 \cdot 10^m},$$

kie  $A$  kaj  $m$  estas tutaj nombroj, plene arbitraj.



### Problemo.

El punkto interne egalfanka triangulo  $ABC$  estas metitaj tri perpendikularoj al la flankoj  $AB$ ,  $BC$  kaj  $AC$ . Oni pruvi, ke el la ses pecoj, difinitaj de tiuj perpendikularoj sur la flankoj, la sumo de l' tri neapudaj estas egala al la sumo de l' tri aliaj pecoj.

Kiu solvos regule tiun ĉi problemon kaj skribos la solvon en bona Esperanto, tiu ricevos de la redakcio senpage unu ekzempleron de "Lingvo Internacia" por la nuna aŭ la pasinta jaro.

La solvojn oni devas adresi al s-ro *S. Ŝatunovski* (Rusujo, Odessa, Puŝkinskaja, d. de Marmarino, loĝ. 4).



### Presa eraro.

Ni deviĝas turni la atenton de niaj legantoj al la presa eraro, kiu okaziĝis kun la "Malgrandrusa kanto" de s-ro V. Devjatnin, presita en nia jara n-ro de tiu ĉi jaro, paĝo 5. Per ia okazo la dua verso prenis la lokon de l' unua kaj kontraŭe; la poemo devas komenci. "Ne pepadu najtingalo..." kaj poste estu legata: "Mi mizera, mal-feliĉa..." — Sur p. 6, linio 12 de malsupre, staras "sempre", devas esti *ĉiam*.

*La Red.*

**Niajn kunlaborantojn** ni kore petas, ke ili volu skribi ĉion difinitan por la gazeto *legeble kaj nur sur unu flanko* de papero. *La redakcio.*



**La gazeton Lingvo Internacia oni abonas:**

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio *Santiago*, Hospitalillo 9, (Coruna).
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.  
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

**Hjalmar Bäckström,**

Luleå, Svedujo

petas Esperantistojn, kiuj deziras viziti Laplandujon. ke ili persone aŭ letere sin turnu al li. Li donas informojn senpage, sendas kartojn, liveras por la vojaĝo en Laplandujo akompanantojn, kiuj scias Esperanton. Oni sciigu lin antaŭ la alveno, kaj li liveras loĝejon kaj renkontas apud vaporŝipo kaj fervojo. Lia adreso:

**Hjalmar Bäckström,**

Luleå, Svedujo.

**MARKI.**

Poŝtsignoj. Timbres-Poste. The Stamps. Die Briefmarken, Gli Francobolli, Los Sellos.

Ĉiumonata ilustrita ĵurnalo por filatelistoj, organo de l' Moskva societo filatelista.

Kosto de abono — 1 rublo, sur la papero pli bona — 2 rubloj.

Oni abonas ĉe s-ro **C. D. Solomkin:** Rusujo. Kiev. Bulvarno-Kudrjavskaĵa, 23.

**F**raŭlo (38 jaroj), polo, oficisto (1.000 rubloj salajro) deziras korespondadi kun konforma esperantistino.

Rusujo, S. Petersburg.

Poste Restante O. O. O.

**Sinjoro E. Arduin**

komercisto en *Bordeaux*, 11 rue Turenne, **Francujo**, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinberco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

La ĵurnalon

**"L'Etranger",**

kiu presas artikolojn interalie en la lingvo Esperanto

oni abonas en Rusujo ĉe s-ro

**V. Gernet.**

Odessa. Puŝkinskaja 44.

La abonpago — 2 r. 80 k. por unu jaro.

**L**a Klubo Esperantista de *Louhans* (Saône-et-Loire, Francujo) deziras komunikiĝi kun la aliaj kluboj esperantistaj. Ĝi petas ilin sendi al ĝi la adresojn kaj la nomojn de iliaj membroj.

**Enhavo de tiu ĉi numero.**

	Paĝo.
<i>Al la esperantistoj.</i> . . . . .	49
<i>Kapitalo de d-ro Zamenhof, de V. Gernet.</i> . . . . .	50
<i>La lingvo Esperanto en la servo de ĵurnalismo, de P. K. Toksvig.</i> . . . . .	52
<i>Novajoj</i> . . . . .	53
<i>Pli bone nenion ol tian ion, de V. Gernet.</i> . . . . .	55
<i>Memmortigoj, rakonto de Guy de Maupassant. Tradukis A. M. Grünfeld.</i> . . . . .	57
<i>Nia lingvo en Islandujo, de Jón Jónsson.</i> . . . . .	60
<i>Kalkula raporto, pri la eldonado de "Lingvo Internacia" en 1896.</i> . . . . .	61
<i>Informejo de Esperantistoj.</i> . . . . .	62
<i>Raporto pri la solvo de la problemo, presita en la n:o 9 de Lingvo Internacia 1896.</i> . . . . .	62
<i>Problemo.</i> . . . . .	63
<i>Anoncoj.</i> . . . . .	64